


ORGANO DE
ASTURA ESPERANTO ASOCIO


CATEDRA DE EXTENSION
UNIVERSITARIA



UNIVERSIDAD de OVIEDO



GIJON



Novembro – Decembro 1981

Nº 23

NIA ANTENO

La plej grava evento en la lasta dumonata periodo de la finiĝanta jaro estis, nedubeble, la ZAMENHOF-TAGO. La ceteraj ativecoj de nia Asocio disvolviĝis kiel kutime: la E-kurson por komencantoj partoprenas, pli malpli, la sama nombro da personoj, kiuj ĝin iniciatis kaj kiuj daŭre montriĝas vere interesataj pri nia Lingvo; du fojoj ĉiusemajne okazas iaspeca supera kurso, konversacia por praktika aplikado de Esperanto, kiun ĉeestas kaj partoprenas lernintoj de la antaŭaj lernojaroj, ktp. ,ktp. Sed, speciale brilis pro sia sukceso la ĉi-jara ZAMENHOF-TAGO en nia urbo, kies festado okazis dimanĉon, la 20-an de Decembro, kaj kiu disvolviĝis laŭ jena:

PROGRAMO

10,30 h. - Akcepto de gepartoprenantoj kaj "Interkona Mateno".

11-a h. - Malfermo de la Festo, en la Teatro de la Katedro "Jovellanos" fare de nia Prezidanto, kiu legis paroladeton pri Zamenhof kaj Esperanto (verkita de s-ano Alcibiades González, kiu mem ne povis partopreni la Feston, kaj kiun ni publikigas aparte).

Poste la Ensemblo "Jovellanos" pri Kantoj kaj Dancoj, laŭreato en diversaj internaciaj konkursoj, prezentis diversajn kantojn kaj dancojn kun akompanaĵo de tamburo kaj sakŝalmo ludataj de du famaj specialistoj. La arta prezentado kaj la buntaj tipaj kostumoj estis vera plezuro por la spektantoj, kiuj per forta aplaŭdado premiis ĉiun unuopan prezenton.

La prezentitaj kantoj kaj dancoj estis jenaj:

1-a Parto: "Giraldilla"
"Jota de Pajares"
"Corri-Corri"
"Pericote"
"Xiringüelu"
"Jota de Cadavedo"

2-a Parto: "Jotina de Avilés"
"Quirosano"
"Ligero (Jota Asturiana)"
"Jota de La Llana"
"Vaqueiras"

Dum la unua interakto kaj tuj antaŭ ol la lasta danco, 5-jara infanino, Ana Rosa, vestita per tipaj asturiaj vestaĵoj, simpatie kaj parkere deklamis kelkajn mallongajn ŝercajn monologojn.

13-a h. - La gesamideanaro translokiĝis promenante al la strato ESPERANTO sur kies nomtabulo du junulinoj, vestitaj per tipaj kostumoj, metis florbukedon.

14,30 h. - En Restoracio "El Retiro" okazis bankedo, kiun partoprenis 34 gesamideanoj, kaj kiu disvolviĝis en etoso de frateco kaj bonhumoro, kun kantoj, ŝercoj, anekdotoj, ktp., ktp.

Pri la ZAMENHOF-TAGO informis lokaj ĵurnalo kaj semajna komerca informilo; Radio Oviedo, ĵaŭdon la 17-an je la 8,30 h., en programo por la Nacia Informado ("Cadena Nacional"), kaj Radio Gijón, la saman tagon je la 15,15 h.

= 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0

P A R O L A D E T O

legata en la ateneo "Jovellanos", de Gijón,
en la 20ª de decembro de 1981ª,
okaze de la Zemnhof-tago organizita de
ASTURA ESPERANTO-ASOCIO

Señoras, señores y "gesamideanos":

Con la lectura, que ahora inicio, de estas breves líneas, se da comienzo a los actos organizados por la ASTURA ESPERANTO-ASOCIO, es decir, la ASOCIACION ESPERANTISTA ASTURIANA, en memoria y honor del creador de la Lengua Internacional Esperanto, Dr. Lázaro Luis Zamenhof, de cuyo nacimiento en Bialystok (Polonia) se cumplieron el pasado martes, día 15, los 122 años.

Era el Dr. Zamenhof uno de los pocos grandes idealistas que han dejado profunda e imperecedera huella en toda la Humanidad y que, llevados de una irresistible inclinación a mejorar en lo posible la situación del Hombre sobre la Tierra, no vacilaron en dedicar toda su vida, llegando para ello a cotas de sacrificio, a luchar por el fin que un día se propusieran como medio más idóneo para lograr el mayor bienestar para sus semejantes.

De los 57 años que duró su vida, se puede decir que Zamenhof dedicó más de 40 a pelear por sacar adelante su idea de dotar a la Humanidad de una solución a los problemas que la diversidad de lenguas acarreaba y acarrea todavía. De esos más de 40 años, los primeros, los de su época juvenil, estuvieron dedicados a la creación, estructuración y perfeccionamiento del Esperanto, tarea que simultaneaba con sus estudios, y los posteriores, siendo ya médico oculista, a la tarea de fomentar su criatura y enriquecerla y darle vida intelectual y literaria a través de las traducciones que de otros idiomas que él conocía y dominaba iba haciendo.

La vida del Dr. Zamenhof, como la de cualquiera otro de los genios que la Humanidad ha producido, es en extremo interesante. Interesante, instructivo y apasionante es seguir paso a paso todas las fases del desarrollo de su idea, desde el conocimiento de las causas que determinaron su nacimiento hasta el final de su fructífera vida. Pero las exigencias de la programación de los actos del día de hoy no me permiten profundizar más en ese terreno. Por lo cuál me limitaré a esbozar rápidamente algunos de los aspectos que considero más adecuados para ser expuestos al conocimiento del público en una fecha como la de hoy.

Nació Lázaro Luis Zamenhof, como ya queda dicho más arriba, el día 15 de diciembre de 1859, en Bialystok. Su padre, Marcos Zamenhof, era profesor de idiomas. A la edad de 14 años se trasladó, con su familia, a la capital de la nación, Varsovia, ciudad en la que comenzó sus estudios y realizó un primer proyecto de idioma auxiliar internacional no muy parecido al Esperanto, fruto de sus posteriores trabajos. A ese su primer intento le bautizó con el nombre de "lingwe universala". Más tarde, en el año 1879, ingresó en la Facultad de Medicina de Moscú. En el año 1885 terminó la carrera de medicina y dió también fin a su tarea de elaboración de un idioma auxiliar internacional, el que hoy es conocido con al nombre de Esperanto, nombre que se debe a que ése fué el seudónimo que Zamenhof empleó al publicar su primer libro sobre dicho idioma, libro cuya aparición, en 1887, casi coincidió con el matrimonio de Zamenhof con Clara Silbernik. Cuando esto sucedía, ya había pasado por Viena, ciudad en la que cursó estudios de oftalmología. Si hasta la aparición de su primer libro había trabajado intensamente en su proyecto, sin que para ello fueran óbice sus otras ocupaciones, tras dicha aparición ya se dió por entero a la realización de aquella idea, o más bien de aquel ideal, que desde su primera juventud le atenazaba, empeño en que no ce-

jó hasta que la Parca, que no hace distinción entre buenos y malos, entre útiles e inútiles, entre laboriosos y vagos, nos lo arrebató un día 14 de abril de 1917.

Tratada así, a grandes rasgos, la vida del Dr. Zamenhof, echemos ahora una mirada a su obra, mirada que también, forzosamente, ha de ser rápida y superficial.

Es el Esperanto una lengua creada, como ya se ha dicho repetidamente en lo hasta ahora expuesto, para servir como Lengua Auxiliar Internacional, es decir, que su papel será el de ser, por así decirlo, una segunda lengua para todos, pero NUNCA el de suplantar a ninguna de las demás lenguas habladas en el mundo, como algunos, maliciosamente, quieren propalar. Su aprendizaje es mucho más fácil que el de cualquiera de los demás idiomas conocidos hasta hoy, debido a que su autor tuvo muy buen cuidado y realizó todos los esfuerzos para estructurarla de forma adecuada para conseguirlo, simplificando su gramática hasta un grado casi increíble y dotándola de unas reglas para la formación de las palabras mediante los llamados "afijos", o sea, los "prefijos" y los "sufijos", y, por último, conservando en ella las palabras que se pueden considerar de empleo universal, como, por ejemplo, teléfono, telégrafo, vagón, público, radio, etc., etc., etc.; pero, eso sí, adaptadas éstas a la ortografía propia del idioma Esperanto, así como a su fonética. El resultado ha sido un idioma sencillo, muy rico, flexible y de pronunciación fácil y sonido agradable al oído y de clara percepción. Sabido es que una de las mayores dificultades que se hallan en el estudio de los idiomas es su gramática. Pues bien: la gramática del Esperanto, sus reglas gramaticales básicas, se aprenden TODAS perfectamente en una hora, y la conjugación de sus verbos solamente necesita unos pocos minutos para ser aprendida.

Bien quisiera ilustrar todo lo dicho con unos cuantos ejemplos, pero ello requeriría algo más de tiempo, del que ya no dispongo, porque otros puntos del programa de hoy me lo impiden. Así, pues, agradeciendo a todos ustedes su atención y su interés, así como su presencia en estos actos, me despido de ustedes y cedo el paso al resto del programa. Muchas gracias.

——— . ——— . ——— . ——— . ———

LA VOJO AL LA SENLABORECO

daŭrigo

Nu, jen la laboristoj sen laboro kaj sub la protekto de ŝtata helpo, helpo ĉiam limigita kaj ne sufiĉa por subteni la ordinaran vivon,Sed paradokse, estas la laboristaro mem, kiu pagas la nomatan ŝtatan subvencion.Kial kaj kiel ? Simple, la ŝtato plialtigas la impostojn, do ne estas la entreprenisto kiu pagas tiujn kromajn impostojn, ĉar li siavice plialtigas la prezojn de la varoj.La rezultato estas ke, kiam la laboristo devas aĉeti la ĉiutagajn bezonaĵojn, ĉio estas pli multekosta.La burĝa ŝtato aperas kiel la granda savanto de la malfeliĉa senlabora laboristo, dum la fiaskinta entreprenisto restas trankvile en sia hejmo kun senriproĉa konscio.Tiel estas la vivo de la laboristo.Estas necese aldoni, ke neniu fiaskinta entreprenisto vere ruiniĝis.Li ĉiam rezervas por si, sufiĉajn vivrimedojn por solvi siajn proprajn problemojn.

Estas evidente, ke antaŭ perdi sian laborpostenon, la laboristo ege batalas por ĝin konservi.La laboro estas la nura havaĵo, kiun posedas la laboristo, do, perdinte la laboron la laboristo troviĝas en la plej granda mizero, pro tio estas kompreneble ke la laboristo batalu por konservi sian laborpostenon, kaj kiam ĉi tio eblas, li devas agi energie, kuraĝe kaj solidare kun la ceteraj kamaradoj por atingi la plej grandan rekompencon pro siaj laborjaroj.Tiun taskon kontraŭstaras la mastro, ĉar tio signifas, ke li devas demeti de siaj rezervoj monkvanton, kiun li jam kalkulis destinita por si.Eĉ en tiu tereno de la monkompenco, surbaze de leĝoj starigitaj de li mem, de la burĝaro, la mastro ŝarĝas tiun problemon al la ŝtato.Ni jam vidis, ke por pagi la subvencion dum limigita senlabora tempo al tiu laboristo, kiu perdis sian laborpostenon, la mastro enŝovis tiun respondecon al la ŝtato kaj same okazas, kiam venas la horo por monkompenci la maldungitajn laboristojn.Sed oni ne pensu ke tiu monkompenso jam sufiĉas por vivi dum kelkaj jaroj, ĉar maksimume ĝi atingas unu jaron.Kaj ankoraŭ restas pli pintoreskaj faktoj kiaj estas, ke en iuj okazoj eĉ la mastro ricevas monon por ĉesigi sian negocon kaj li rajtas ambaŭ ŝtatajn helpojn, tiun senlaboran kaj tiun monkompencan.Kia socio !!

Tre ofte, la lukto por ne perdi la laborpostenon fariĝas akra, neracia, tiel ke la laboristoj devas agi kontraŭ sia propra volo.Estas stranga afero ke, la laboristo oferas siajn laborfortojn por ke la mastro fariĝu pli riĉa, kun la nura kondiĉo ke, li, la mastro, estu kapabla taŭge utiligi tiujn fortojn, sed la kapitalistoj, kvankam ne ĉiuj, komprenoble, ne kapablas tion kompreni kaj anstataŭ profiti tiujn oferitajn fortojn li vidas en la laboristaro ion, kio intencas ruinigi lin.En ĉi tiun kondiĉoj la bona disvolviĝo de kiu ajn entrepre

no ne eblas kaj venas la disfalo.

En ĉi tiu momento komenciĝas la proceso por fermi la entrepreno kaj maldungi la laboristojn. Oni alvokas la laboristajn delegitojn al la entreprena direkcio kaj oni anoncas la decidon ĉesigi ĉian laborajon. En multaj okazoj oni kulpigas la laboristojn, pro lia neinteresiĝo por la laboro, kiam ĝuste oni devas diri, ke la fiasko estas nura kulpo de la entreprenisto, kiu ne kapablis gvidi bonorde sian entreprenon, pri kiu li ja neniam petis la laboristan opinion, kvankam tio jes, li ne hezitas ŝarĝi la kulpon al tiuj, kiuj neniam nenion decidis pri la disvolviĝo de la fiaskinta entrepreno.

Jen ni, sur la vojo al la senlaboreco. Komenciĝas la asembleoj. Ĉiu laboristo eldiras siajn proprajn opiniojn kaj en ĉi tiu tereno nepre kaj bedaŭre oni devas diri, ke malofte ekzistas unuanima opinio. Eĉ ofte, okazas, ke multaj laboristoj ne konscias pri la vera situacio de la entrepreno kaj pri la vera intenco de la mastro. Seriozajn kaj malagrablajn momentojn oni devas travivi. La ruzeco de la mastro ne haltas kaj li serĉas unu kaj mil formojn por dividi la laboristojn, pri kio la fiaskintaj entreprenistoj estas multe pli kapablaj ol por bone regi sian negocon, eĉ mi pensas, ke ili ĝuas tiun situacion. Ili ploras, ploregas, ili sin prezentas kiel viktimoj de la cirkonstancoj, ili kulpigas pri la krizo, la laboristojn, la ŝtaton, kiun ajn ili kulpigas, sed ili sin ne kulpigas, tute ne.

Kiam posedanto de kiu ajn entrepreno decidas ĉesigi sian negocon, certe li atingas sian celon, almenaŭ laŭ la leĝoj nuntempe ekzistantaj en Hispanujo. Do, al la laboristo nur restas unu vojo, la vojo al la senlaboreco. Sed antaŭ eniri en tiun situacion la laboristo devas lukti, batali. Kiom peniga estas tiu lukto, kiam oni scias, ke nur la malvenko atendas nin!! Kiom da problemoj prezentiĝas por la laboristoj maldungitaj!! Oni devas serioze trastudi la situacion. Sed sendube la plej granda problemo prezentiĝas, kiam la mastro decidas ne plu pagi la salajron. La hejma ekonomio de kiu ajn laboristo ĉiam estas malforta, kaj se al tio oni aldonas la nericevon de la salajro, oni devas kompreni en kian malesperan situacion falas la laboristo. Li perdas sian laborpostenon, li ricevas nenian salajron kaj li devas batali por ke oni rekonu al li, liajn rajtojn. Certe estas momentoj ne enviindaj. La feliĉa kaj relativa hejma trankvileco ne plu ekzistas kaj la rilatoj inter la familianoj ne ĉiam disvolviĝas bone. Do, la laboristo vidas sian hejmon ruinigitan, ne nur ekonomie sed ankaŭ spirite. Ĉi tiu situacio estas la plej danĝera, ĉar kiam oni perdas la familian etoson, la familiajn valorojn, la vivo fariĝas nevivinda. Tamen, estas nepre aldoni, ke ĉiuj laboristoj kaj liaj familioj ĝenerale kuraĝe superas ĉi tiun krizon. Ĝi estas io mirinda, la rajto al la vivo pri kiu batalas ĉiu homo, ĉiu laboristo. Kompreneble, pri ĉi tiu amo al la vivo, al la familio, la kapitalistoj komprenas nenion, eĉ ankaŭ ne tiuj fiaskintaj, tio, kio havas valoron por ili estas la plimultigo de la mono, de la povo kaj la ebleco ekspluatadi kiel eble plej multe da laboristoj. Por la mastroj la laboristoj estas io, kion oni povas aĉeti, kaj iliaj problemoj dependas nur de ili. Tiel estas la vivo en nia socio, en kiu oni defendas la rajton de la homo. Almenaŭ tion oni asertas surpapere.

Post tiu grava hejma problemo la laboristo devas alfronti tiun de la en-

trepreno.Eksponi kiel disvolviĝas la asembleoj, estas io, kion mi ne kapablas. Estas tre seriozaj travivaĵoj.Estas io,kion oni devas travivi por ĝin kompreni. Kiaj angoraj horoj !! Mi memoras, ke iam laborkamarado en unu el tiuj asembleoj diris - al mi: amiko "SENLABORULO", kion mi faris por ke oni forigu min kiel hundon, post - tridek kvin jara laborado en ĉi tiu entrepreno ? Mi ja estis bona laboristo, mi neniam protestis, li aldonis.Kion oni povas respondi al li ? Nenion.Kaj tio estis kion mi faris, mi ne prirespondis lin. Mi - kamaradece manfrapetis lian maldekstran - ŝultron kaj tio estis mia respondo.Se li en tiu singulara momento ne kapablis kompreni la kaŭzon de sia situacio, kion oni povas fari ?

En la asembleoj estas la delegiton , kiuj informas pri la lastaj decidoj de la mastroj.La vidpunktoj de ambaŭ, tiu de la laboristaro kaj tiu de la mastro estas de komence tre malsimilaj.Tamen, ĉiuj havas la konvinkon ke interkonsento establiĝos, ne estas alia solvo; sed kia solvo !! Antaŭ ĉi tiuj diskutadoj la mastro jam elektis sian agmanieron, li jam elektis la vojon plej interesan por li.La laboristaro nur povas reagi post la decido de la entreprenisto, sed okazas ke ne ĉiam ĉio disvolviĝas laŭ lia antaŭvidita programo, ĉi tio varias laŭ la luktokapablo de la laboristaro, do, ofte la mastro estas devigata cedi en tiu aŭ alia punkto.Kvankam mi devas ripeti, ke la laborposteno estas definitive perdita.

Kiamaniere luktas la laboristoj por atingi siajn minimumaj rajtoj ? La luktado estas tre diversa kaj ofte pintoreska. Kiam la laboristo ne ricevas sian salajron li haltigas la laboron, li ne plu laboras, tio jam estas kompreneble, tiu estas la unua reago.Ofte dum ĉi tiu lukta periodo, la laboristaro enfermiĝas en la laborejo.Nu, komenciĝas la asembleoj,dum kiuj oni proponas la vojon sekvotan, aŭ pli bone dirite, la vojojn sekvotajn, ĉar - fakte oni elektas kelkajn luktoformojn. Poste, kaj laŭ disvolviĝas la kontaktoj kaj diskutoj kun la entreprenistoj, oni eliminas tiun aŭ alian proponon.Fakte , la lukto baziĝas sur tri punktoj.Unua, la rilatoj kun la entrepreno; dua,informiĝo ĉe la oficialaj instancoj pri la - boristaj rajtoj kaj kontaktoj kaj konsiloj de sindikatoj kaj tria punkto estas eksterigi la problemon per surstrataj - demonstracioj, manifestacioj, pendigo - de afiŝoj kaj informado en la ĵurnaloj. Kompreneble se la fiaskinta entrepreno estas granda, tiam la laboristaj vid - punktoj povas atingi eĉ la televidon, - sed tio okazas tre malofte, preskaŭ neniam.La lukto en la strato, kies celo - estas influi la loĝantaro pri la situacio en kiu troviĝas la manifestaciantoj, perdintaj la laborpostenoj, estas tre - peniga.Estas iuj homoj, kiuj pensas, ke tiom jam oni faras kaprice, kvazaŭ amuzaĵo, eĉ iam la manifestaciantaj senlaboruloj estas insultataj,Kiaj malĝogaj momentoj, kiaj malfeliĉaj horoj !! La perdo de laborposteno, la familia situacio, la estonta malcerteco kaj tiu malaprobo de la laborista lukto.Sed ankaŭ en la strato oni trovas solidarecon, fare de aliaj kamaradoj, de la progresemaj intelektuloj, de ĉiu honesta homo, konklude de ĉiu persono defendanta la rajtojn de la homo.Ofte publike oni petas helpon al ĉiu preterpasanto, oni etendas la manon, kvazaŭ ni estus mizeruloj, vagabondoj.Ne estas enviindaj tiuj travivaĵoj, kara leganto, kredu min.Oni petas helpon al aliaj kamaradoj, kiuj ankoraŭ laboras en aliaj entreprenoj. Per

tiu mono oni aĉetas manĝaĵojn, kiujn oni distribuas inter la laboristoj, kies familioj bezonas urĝan helpon.Ĉi tiu surstrata lukto malpliiĝas paralele al la aprobitaj interkonsentoj inter la laboristoj kaj entrepreno.Necese estas aldoni, ke ne ĉiam ĉi tiuj surstrataj manifestacioj disvolviĝas pace, ofte la nomataj – "fortoj de la ordo" batas la malfeliĉajn laboristojn.Jen la panoramo, sen laboro, insultataj, batataj, malesperiga estonteco kaj la familio en la plej granda mizero, tiu estas la bildo de nia bela homa kaj racia socio, nomata ekonomio de merkato aŭ kapitalisma.


Unueco de la diversaj sindikatoj jam devus ekzisti, sed ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne estis ebla tiu unuiĝo, tiu sindikata diverseco ankaŭ ne favoras la lukton de la laboristoj.Tamen ĉiu sindikato klopodas, kiel eble plej multe, helpi la laboristojn.La sindikataj konsiloj estas ege valoraj kaj regule la laboristoj agas laŭpropone de la sindikatoj.Estas evidente, ke unu el la plej gravaj celoj de la sindikatoj estas veki la lukton de la laborista klaso por krei plej homan kaj racian socion.En ĉi tiuj hodiaŭaj luktoj pro la krizoj ekonomia kaj labora, kiuj skuigas nian burĝan socion, la sindikatoj preparas kaj instruas la laboristajn – gvidantojn, samtempe kiam ili, la sindikatoj studas kaj aplikas la plej modernajn kaj akdekvatajn luktoformojn , cele al socio pli homa, pli justa.

Ĉu ĉi tio estas novelo ? Certe ne, ĝi estas la reala vivo de honestaj homoj kiuj konstante luktas por mizera salajro per kiu subteni la familion.Estas homoj, kiuj ĉion perdas kiam ili ne plu havas sian laborpostenon.Estas homoj, kiuj havas nenion.Estas homoj kies vivoj, ne apartenas al si mem, sed al tiu alia "sinjoro", kiu propravole povas meti ilin – en la plej mizeran situacion.Estas homoj, kiuj nenion rajtas laŭ nia kapitalisma socio.Estas homoj malfeliĉaj.

Ĉi tiu estas la granda novelo de – la vivo, novelo, kiu havas nek tradukon nek premion.

LUIS SERRANO PEREZ

– SABADELL –



ĈIULANDAJ PACPROPAGANDILOJ SERĈATAJ

Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn plakatojn, sloganojn, flugfoliojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, protestkanzonojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, glumarkojn kaj aliajn pacpropagandilojn por siaj jam tradiciĝintaj migrantaj porpacaj ekspozicioj.

Laŭdezira rekompenco, en formo de libroj, revuoj, albumoj, sondiskoj, diapozitivoj, memoraĵoj, ktp, garantiita !

Bonvolu adresi ĉion al: SAMARKANDA ESPERANTO KLUBO DE INTERPOPOLA AMIKECO
SU – 703000 SAMARKANDO
Glavpoĉtamt, p.k. 76
Uzbekistano (U.S.S.R.)

Validas ĉiam ! Represo kaj nacilingvaj tradukoj petataj !

Salvador Espriu

V E R S O J

Kun muziko plifacilos al vi aŭskulti tion ...

Mi ĉiam diras al vi la veron.
Kaj se tiom ofte mi rakontas al vi pri
mia ĉiutaga kaj soleca morto,
se kun tia kruela reliefigo
ununuran literon de mia modesta scio
mi proklamas obstine,
tio okazas nur tial, ke mi volas, por ke vi sentu
en profunda interno, profunde, ke tie finiĝas
malvarma vojo de via lasta tombo,
kiel humile, silente,
mi amas vin.
Ĉu vi vivas ? Por herbo estas tiu facila trablovo,
por mi kaj por vi, virino kaj viro,
kaj ĉies nomoj kun tiel rompiĝema belo,
kaj tiu ĉi vespero estas por ni
eble semorta.
Sed vi neniam kapablos diveni el miaj okuloj,
kiu mi estas, kia mi estas, kaj vi nun superŝutas
malplenan, densan kaj laŭtan
argilon el vortoj,
ĝis el ili ekestos muro ne transirebla,
mallonga koridoro, kiu
jam nerevokeble disigas min
de vi.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Alrigardu, tra mia spegulo trasoviĝas strangaj respeguliĝoj

Antaŭ mia lasta spegulo, kaj vidante tutan min,
malsanan, eble jam ĉefine,
kondamnitan eble, kun tiel pala vizaĝo,
mi eldiras malrapide iajn vortojn klarajn,
belajn, rompiĝemajn, plej noblajn kaj sublimajn,
kiajn mi trovas en mallumo de mia rememoro.
Sed de longa tempo aperadis tie ĉi
grasaj bestoj je gruecaj kaj moliĝintaj korpoj,
el ĉiuj anguloj alrompis ĝis al miaj lipoj
fervorante ĵus naskitajn esprimojn ;
ĉu vi ne aŭdas ĉiam tiun obtuzan krevbruon
de pergameno, frakasatajn ostojn, vitron ?
Kaj en la spegulo tiam aperadis
malrapide iu bildo facile renversebla,
kies sencon ankaŭ vi povas elĉifri,
se vi, simile al mi, efektivigos ankaŭ tiun specifan provon:
en kiu ajn momento enrigardi en profundon de via vizaĝo
provante samtempe ree tiun neeblan,
tiun senbezonan aĵon : kreadon pere de vorto.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Verkis: Salvador Espriu; Tradukis: E.Dembski; Kompilis Sacramento Collado

DISTROJ

Supo de literoj

Ĉ	I	A	M	O	N	O	M
O	N	O	N	A	K	O	O
T	K	O	L	I	S	U	F
O	L	Ĥ	I	K	U	T	O
V	A	L	E	N	C	I	O
A	B	T	G	U	L	P	T
L	O	N	U	P	R	A	H
G	I	V	E	R	O	S	O

Tiu ĉi kvadrato plena da literoj enhavas ses nomojn de argiloj. Serĉu ilin ! Pro tio vi povas legi horizontale, vertikale kaj eĉ diagonale — en ambaŭ direktoj sed ne transsaltu literojn.

Movoj de kavaliro

EL,	TAJ	DI	SED	★
ON	NE	ŜO	E	RAS
MUL	LA	VOR	ĈIUJ	RAS,
★	I	LI	BU	TOJ

Komencante per la silabo EL (nigreta), kaj laŭ la kavalira movo en la ŝakludo, trovu konatan proverbon.

SOLVOJ AL LA ANTAŬAJ ENIGMOJ

MOVO DE KAVALIRO:
Uzu tempon estantan, antaŭvidu estontan, memoru estintan.

P	O	M	I	[illegible]	N	O	J
[illegible]	[illegible]	E	S	[illegible]	I	T	O
[illegible]	[illegible]	A	[illegible]	[illegible]	O	N	E
[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	M	A	S
[illegible]	[illegible]	O	[illegible]	[illegible]	N	D	E
[illegible]	[illegible]	P	[illegible]	[illegible]	N	D	
I	[illegible]	P	[illegible]	U	[illegible]	D	I
[illegible]	[illegible]	P	[illegible]	[illegible]	[illegible]	A	S

ESPERANTA PROVERBARO
- Tro saltas la rato, ĝin kaptas la kato.
- Kie lumo ekzistas, ankaŭ ombro troviĝas.
- Sperta mano ne restas sen pano.
- Rostita kolombeto ne flugas al buŝeto.
- Pro multo da arboj, li arbaron ne vidas.
- Barelo malplena sonas plej laŭte.
- Muso la katon ĉiam ofendas.
- Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.

Antaŭnomo	Antono	Ludoviko	Johano	Petro
Kravato	nigra	blua	-	Kaŝtankolora
Ĉemizo	ruĝa	blanka	flava	brunkolora
tabako	cigaro	pipo	nigra cigaredo	blonda cigaredo

KOMPLIKA PROBLEMO

Kvar junulinoj atendas sian vicon en beleca salono.

1ª) Elizabeto kunportas ruĝajn ŝuojn.
2ª) Brigita sidiĝas dekstren de tiu fraŭlino, kiu estas 19 jaraĝa.
3ª) La vesto de Dalila estas brunkolora.
4ª) Alica ne havas grizajn ŝuojn.
5ª) La vesto de tiu fraŭlino, kiu havas blankajn ŝuojn, estas flava.
6ª) Tiu, kiu estas 15 jaraĝa, kunportas bluan veston.
7ª) Dalila ankaŭ ne estas 20 jaraĝa.
8ª) Tiu, kiu estas 17 jaraĝa, sidiĝas la plej malproksime de la pordo, kaj siaj ŝuoj ne estas nigraj.

Ĉu vi bone komprenis tiujn postulojn, verŝajne ne estos por vi malfacila tasko scii kiu fraŭlino havas verdan veston.

1 G	2 C	■	3 F	4 B	■	5 G	6 D	7 D	8 A	9 Ĉ	10 A	■
11 B	12 Ĉ	■	13 B	14 G	■	15 E	16 F	17 Ĉ	18 A	■	19 A	20 Ĉ
21 D	22 F	23 C	24 G	25 G	■	26 B	27 E	■	28 F	29 C	30 G	31 A
32 A	33 E	34 F	■	35 D	36 B	37 C	38 G	39 E	40 G	41 C	42 D	43 Ĉ

ENIGMO

A _32 _31 _18 _8 _19 _10 — Konjugacia tempo de la verbo vendi.
B _11 _26 _4 _13 _36 — Patrino de patro aŭ patrino.
C _23 _2 _37 _41 _29 — Ricevi en la konscion impreson, kiun ni klasas kiel agrablan aŭ malagrablan.
Ĉ _12 _17 _43 _20 _9 — Rilata al parto de la tersurfaco, rigardata kiel geografia apartaĵo.
D _21 _42 _7 _35 _6 — En ronda maniero.
E _15 _27 _39 _33 — Serio da objektoj aŭ estaĵoj, arangitaj en linio, unu apud aŭ post la alia.
F _28 _22 _3 _16 _34 — Ke havis revon.
G _5 _40 _25 _1 _38 _30 _14 _24 — Ekscito de emocioj komunaj al multaj homoj aŭ de vigla intereso inter ili.